


La 14an - la 15an de oktobro 2015

Vojaĝeto al la urbo Minami-Sooma

Mi kaj nepala junulo Pradip vizitis la urbon Minami-Sooma de la gubernio Fukuŝima. Tiu ĉi urbo konsistas el 3 distriktoj. La plej suda distrikto Odaka situas ene de la radiuse 20-kilometra zono de la difektita nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, tial ankoraŭ nun la loĝantoj ne rajtas loĝi tie. En la centra distrikto Haramaĉi, antaŭe senhoma pro la akcidento, nun homoj loĝas ŝajne normale. En mia koro ĉiam restas bildo de la elementa lernejo Odaka, kies gelernantoj ĉiuj dise fuĝis en fremdajn lokojn kaj neniam revenas, postlasinte siajn havaĵojn en la klasĉambroj. Mi volis, ke ankaŭ Pradip vidu kaj sentu tiun tragedion.



Tiu detruita tombejo nun

La 14an je la 8a horo ni atingis la stacidomon de la urbo Minami-Sooma per buso de la urbo Fukuŝima. Apud la stacidomo ni prunteprenis biciklojn senpage. Nuntempe en Japnaio ĉe ĉiuj grandaj stacioj oni disponigas biciklojn senpage aŭ kun iom da pago. Ĉi tie jam antaŭ la 9a horo oni komencis tiun servon. La bicikloj ne estis en bona stato, do kun iom da malkontento ni ekstartis al la marbordo de la urbo.

Mia plano estis bicikli laŭ la marbordo ĝis la distrikto Odaka, sed tio tute ne eblis, ĉar laŭ la marbordo oni konstruas grandan kontraŭcunaman digon, tial la vojo estis blokita. Laŭ mia opinio, pli grave estas rapida konstruo de decaj domoj por la suferantoj, ol konstrui digon por protekti senhoman dezerton, sed por la registaro profitigi la grandajn entreprenojn estas pli grave.



En la supra foto vi povas vidi nigrajn sakojn maldekstre sub la konstruota digo. Mi forĝesis mezuri radioaktivecon ĉe ili, do mi ne estas certa, sed mi suspektas, ke ili enhavas radioaktive poluitan teron, ĉar ili estas tre similaj al la sakoj troveblaj ĉie en Fukuŝima, en kiujn oni enmetas poluitan teron.



Ni ne povis plu iri, do ni direktis nin alidirekten, kaj trovis novan budhan statuon fore. Mi rememoris, ke tie antaŭe estis detruita tombejo (foto). Mi jam vidis multajn tombejojn en la detruitaj urboj, sed tiu ĉi estis la plej mizera kaj malĝojiga tombejo, perdinte preskaŭ ĉiujn

tomboŝtonojn. Antaŭ la cunama atako ĝi estis ĉirkaŭata per verdaĵoj same kiel parko, sed post la cunamo ĝi estis en la dezerto. Staris ŝtonaj budhaj statuoj sen kapo, sen brako, sed nun je mia ĝojo ĝi estas rekonstruita, kvankam ne multis starigitaj tomoboj.

Laŭ la klarigtabelo en la tombejo, dank' al la nova leĝo por helpi la suferantajn urbojn, la posedantaro de tiu ĉi tombejo ricevis 112 milionojn da jenoj da subvencio (1,12 milionojn da eŭroj) de la urbo Minami-Sooma (eble el la ŝtata buĝeto). Tamen estas certe, ke la tomboposedantoj devos repagi la tutan aŭ partan ŝuldon. Ĉu ĉiuj volas rehavi sian tombon ĉi tie post perdo de sia domo? Certe troviĝas familioj, kiuj ne plu volas aŭ plu povas havi tombon ĉi tie. Ŝajne la bele rearanĝita tombejo estas espero por ili, sed en efektiveco teni ĝin estas malfacile.



Tie laboris 3 viroj. Mi demandis ilin, kie oni metis aŭ forĵetis malnovajn tomboŝtonojn. Ili respondis, ke oni tiujn pecigis kaj enterigis sub la nove aranĝitan tombejon.

Kukejo Ŭatanabe en la distrikto Odaka

Baldaŭ ni atingis la distrikton Odaka. La stacidomo estis kovrata per kovriĵoj kaj sur la reloj laboris kelkaj homoj, do post ne longe oni refunkciigos la trajnan servon.

Antaŭ la stacidomo estas vendejo nomata Engaŭa. Antaŭ kelkaj semajnoj mi vidis en televido, ke tiu vendejo malfermis kaj en ĝi kukisto s-ro Ŭatanabe ekvendis kukojn. Kiam mi vidis tiun novaĵon, mi larmis pro emocio.



Tiu s-ro Ŭatanabe havis/havas sian kukejon en tiu ĉi distrikto. Kiam mi vizitis ĝin en junio 2012, antaŭ ĝi estis nigra tabulo, sur kiu li skribis per kreto: “Mi certe revenos al Odaka”, kaj en 2013 liaj vortoj ekmalaperis. Mi rigardis tiun tabelon kun malĝoja sento, do kiam mi vidis en televido, ke li malfermis novan kukejon en la distrikto Haramaĉi kaj vendas kukojn ankaŭ en tiu ĉi vendejo, tio estis grandega ĝojo por mi. Nun anstataŭ la nigra tabulo, de la tegmento pendas granda slogantuko kun la vortoj: “La kukejo Ŭatanabe nepre reviviĝos kune kun la loĝantoj de Odaka”.

Mi eniris en la vendejon kaj aĉetis 10 kukojn. Mi planis viziti lian novan kukejon, sed la vendistino informis min, ke en la sekva tago lia kukejo estos fermita, do mi rezignis viziti ĝin.

La elementa lernejo Odaka

La alia celo estis la elementa lernejo Odaka.

La katastrofo okazis en vendredo, la 11an de marto. Ĉiuj lernantoj haste revenis hejmen, postlasinte siajn havaĵojn en la ĉambro. En 2012 somere estis permesite por la loĝantoj eniri en la distrikton. Ankaŭ la instruistoj revenis kaj aranĝis la ĉambrojn. Ili kolektis havaĵojn de lernantoj kaj metis tiujn respektive sur la tabloj. Poste iuj vizitis la lernejon kaj prenis la sian, sed kiam mi venis ĉi tien en aŭgusto 2013, en ĉiuj ĉambroj restis 6 aŭ 7 tabloj, sur kiuj estis iliaj havaĵoj. Tiuj lernantoj neniam revenis ĉi tien. Sur la nigraj tabuloj estis kuraĝigaj kaj kortuŝaj vortoj de la instruistoj. Apude estis kelkaj vortoj de lernantoj, ekzemple: “Mi volas revidi miajn amikojn”, “Mi nun loĝas en la urbo Sagae en la gubernio Mijagi”.



Mi enrigardis la ĉambrojn en la unua etaĝo. Ili estas ĉambroj por gelernantoj en la unua aŭ la dua lernoĵaro. Same kiel antaŭe restis havaĵoj sur la tabloj. Ili neniam revenis al sia lernejo. Geknaboj en la unua lernoĵaro en 2011, jam estas en la kvara lernoĵaro nun, kaj geknaboj en la 6a lernoĵaro tiam nun estas en supera mezlernejo. Kian vivon ili havas? Ĉu ili bone adaptiĝis al la nova vivo? Ĉu ili ne suferas pro mensa problemo? Kiam mi unuan fojon vidis la tablojn kun la havaĵoj, mi larmis, kaj malamis la registaron kaj la elektrajn kompaniojn, kiuj enkondukis nuklean energion en Japanion kaj suferigas senkulpajn gelernantojn, tute ne sin kritikante.

Elementaj lernejoj en Fukuŝima estas belegaj. Ankaŭ la elementa lernejo Odaka estas bela kun belaj reliefoj. Tamen ĝi staras solece sen gajaj voĉoj de lernantoj. En la

ĝardeno de najbara domo fruktas belaj persimonoj. Ĉio estas bela, sed ĉio estas trista sub la aŭtuna ĉielo.

Parkeca Tombejo en Minami-Sooma

Matene la 15an ni iris al la Parkeca Tombejo sur monteto de Minami-Sooma. Ĉi tie staras statuo de kamikazo, ĉar dum la milito en tiu ĉi urbo estis aerodromo por kamikazoj. Kiam mi venis ĉi tien en 2013, la forteco de radioaktiveco estis 0,451 mikrosivertoj (laŭ la leĝo oni devas purigi lokojn pli radioaktivajn ol 0,23 mikrosivertoj). Ĉi-foje mi mezuris kaj la cifero estis 0,412.

Kiam ni revenis, ni trovis multajn nigrajn sakojn ĉe la monteto. Mi alproksimiĝis kaj trovis, ke sur ĉiuj sakoj estas skribitaj speco de enhavaĵoj kaj forteco de radioaktiveco. En la dekstra foto sur tri nigraj sakoj en la mezo estas skribitaj “0,29 mikrosivertoj”, “0,29” kaj “0,32” kaj “tero (±) ”.



Sur iu sako estis algluita etikedo, sur kiu estis skribita kvar avertoj, kiam oni uzas ĝin. Unu el ili estis “Oni konservu la sakon ne sub la suno, sed en ĉambro” kaj “Uzulimo estas 3 jaroj”. Ĉie en Fukuŝima oni konservas la sakojn sub la ĉielo. En somero la surfaca temperaturo estiĝas alta, eble pli ol 60 gradoj, pli 70 gradoj. Jam multaj sakoj pasigis 4 jarojn. Ĉu ili jam ne difektiĝis? Ĉu la danĝeraj tero kaj herboj ne eliĝas kaj flugas en la aeron? Ĉu laboristoj ne suferas pro radioaktiveco?

Kiamaniere oni konservas tiujn sakojn? La 15an ni revenis al la urbo Fukuŝima kaj vizitis konservejon ĉe la monteto Ŝinobu 15 minutojn piede de la stacidomo Fukuŝima. Ĉirkaŭe troviĝas multaj domoj kaj eĉ la jura oficejo.



Oni konservas sakojn kvar-etaĝe sub grandega verda kovrilo. Kiom da sakoj estas konservataj kaj ĝis kiam? La registaro nun planas konstrui provizoran konservejon en la urboj najbaraj de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, sed estas malfacile akiri teron por tio, ĉar la loĝantoj ne volas vendi sian teron kaj kampojn hereditajn de siaj prapatroj. La registaro promesas forporti tiujn kelektitajn poluitaĵojn ekster la gubernio Fukuŝima post 30 jaroj, sed neniu kredas tian stultan promeson, ĉar neniu urbo ekster Fukuŝima akceptos tiujn.



Poste mi kaj Pradip promenis ĉirkaŭ la monteto. Sur la stratetoj ludis infanoj kun siaj patrinoj. Mi kaŝe vidis mian dozmetron en mia poŝo kaj trovis, ke tie estis radioaktive je 0,30 mikrosivertoj. Tiun ĉi lokon oni jam purigis, sed ankoraŭ tiel forte radioaktive. Poste mi mezuris ĉe la malgranda fluejo, kie antaŭe la cifero estis 12 mikrosivertoj. Vidu la suban foton. En la ekraneto vidiĝas la cifero 10,0, ne 0,100. Mi

mezuris en multaj lokoj, sed nenie estis tiel forte radioaktive. Tuj apude la cifero falis al 1 siverto. Kial nur en tiu ĉi loko estas tiel radioaktive, mi miris.

Vere la nuklea akcidento donis al ni nesolveblajn problemojn. Certe Pradip sentis feliĉon pro tio, ke li vivas en sennukleenergia lando Nepalo.

Daŭriga epizodo

Unu semajnon post mia vojaĝeto, la 21an de oktobro, mi estis en la maljunulejo en mia urbo, kie mi muzikis koncerton per interesaj muzikiloj el la mondo. Al mi venis telefonvoko de mia edzino kaj ŝi diris: “Baldaŭ iros al la maljunulejo virino nomata Ŭatanabe el Fukuŝima por renkonti vin”. Mi tute ne sciis, kiu estas ŝi. Baldaŭ ŝi venis kaj salutis al mi: “Mi estas edzino de la kukisto Ŭatanabe. Mi venis por danki vin”. Post kiam mi vidis tiun televidprogramon temantan pri la kukisto Ŭatanabe, mi sendis mian fotolibron “Memoroj pri la Japana Katastrofo” kun letero al li, ĉar en ĝi aperas lia kukejo. Lia edzino multe emociiĝis pri la libro kaj mia letero, kaj decidis viziti min okaze de la vizito al ŝia filo laboranta en mia urbo kiel lernanta kukisto.

La kukisto Ŭatanabe laboris unu jaron en Tokio post la katastrofo, sed nervoziĝis pro la vivmalfacilo kaj forta deziro remalfermi sian kukejon en Minami-Sooma. La geedzoj revenis kaj en la lasta decembro sukcesis malfermi sian kukejon en la distrikto Haramaĉi.

Lia filo devis ĉesi studi en universitato kaj nun lernas kukfaradon hazarde en mia urbo Maebaŝi. Antaŭ du tagoj li fariĝis malsana, do ŝi vizitis lin, kaj profitante tiun okazon, ŝi vizitis ankaŭ min. Ŝia filino, kiam okazis la nuklea akcidento, vizitis la superan mezlernejon en Ookuma, kie situas la nuklea centralo n-ro 1. Kun siaj familianoj ŝi rifuĝis al alia urbo kaj ŝi eniris lernejon tie, sed havis malfacilon en la nova lernejo. Ŝia havaĵo ankoraŭ restas en sia eksa lernejo same kiel tiuj lernantoj en la elementa lernejo Odaka.

Kiam homoj ne loĝas, domo facile difektiĝas. En la kukejo Ŭatanabe en Odaka la plankoj falis. Ĉio malnoviĝas. Krome ratoj helpas. Ŝi diris, ke sen grandskala riparado, la konstruaĵo ne estos uzebla.

En televido ŝia edzo dufoje aperis, sed elsendo okazis nur en la regiono Kantoo, do ŝi ne vidis tiujn programerojn. Sed venis kelkaj homoj el Kantoo por aĉeti kukojn en ŝia kukejo.

Kiam ŝi ricevis de mi libron kaj leteron skribitan per peniko kaj ĉina inko, ŝi estis tre kortuŝita kaj kuraĝigita, sciante, ke troviĝas homoj, kiuj helpas ŝian kukejon.



Ŝia vizito al mi estis granda ĝojo por mi. Sendi mian libron kaj skribi leteron estas malgranda helpo, sed tia helpo estas bezonata. Inter la kukejo kaj mi naskiĝis nova homa ligo, nome amikeco, el kio naskiĝu bono en nia socio.

HORI JASUO